

Esperanto: Conceito e o Movimento na Atualidade

Benedicto Silva

Ser eminentemente social, o homem parece ter legado às nações, de que é célula vital, essa natureza comunicativa. Com efeito, à semelhança dos seres humanos, as nações são organismos que mantêm entre si contacto permanente, ininterrupto. Não podem viver isoladas, sob pena de extinguirem-se. Sobrevivem a poder da incessante interação que as une, como acontece entre os indivíduos nos mais elementares grupos sociais. É flagrante mesmo a interdependência das nações.

Do mesmo modo que o convívio dos indivíduos exigiu um instrumento de comunicação que tornasse possível a exteriorização de idéias, de pensamentos e de sensações, as relações dos povos do globo vêm determinando, há séculos, a criação e adoção de uma língua auxiliar internacional. E a necessidade de tal língua patenteia-se principalmente quando meditamos sobre o estado atual dos evoluídos meios de transporte e comunicação criados pela técnica moderna.

O progresso da técnica torna pequeno o globo

Esperanto: Difino kaj Nuntempa Movado

Benedicto Silva

Esence socia estulo, la homo kvazaŭ transdonis sian komunikemon al la nacioj, kies vivoĉelo li estas. Efektive, simile al la homoj, la nacioj estas organismoj tenantaj inter si daŭran, seninterrompan kontakton. Ili ne povas vivi solaj, kio estus ilia ekstermo. Ili supervivas per senĉesa interagado ilin unuiganta, kiel okazas ĉe la individuoj en la plej elementaj sociaj grupoj. Estas ja evidenta la interdependeco de la nacioj.

Kiel la kunvivado de la homoj postulis ian instrumenton de komunikado, ebliganta la esprimadon de ideoj, de pensoj kaj de sensacoj, tiel same la interrilatoj de la popoloj de la terglobo postulas jam de jarcentoj la kreadon kaj adopton de unu internacia helplingvo. Kaj la bezono de tia lingvo montriĝas precipe tiam, kiam ni meditas pri la nuna stato de la progresinta trafiko kreita de la moderna tekniko.

La progreso de la tekniko faras la terglobon

e fácil, portanto, o contacto dos homens. Demolidas as barreiras geográficas e vencidas as distâncias, perdura, entretanto, a barreira das línguas, que se interpõe entre os indivíduos, isolando-os.

Numa época em que se ensaiam, com certo êxito, viagens interplanetárias, é passível de censura o fato de que as nações mais civilizadas não tenham ainda adotado uma língua internacional fácil, lógica e rica, que possa estar em consonância com as demais criações da ciência.

Surgida já no alvorecer da civilização, a idéia de língua auxiliar internacional faz-se cada vez mais atual. A atenção que lhe têm devotado sábios de diferentes épocas e de diversas nacionalidades é prova de que o assunto não é destituído de fundamento e importância, como tem parecido a espíritos sobre leigos, céticos.

Baseando-se na tradição histórica, a mais antiga referência à pluralidade de línguas faladas na Terra encontra-se no Velho Testamento. Segundo a Sagrada Escritura, desde Babel o homem vem sofrendo o desafio das línguas como castigo imposto por Deus pela arrogância humana. De Babel, pois, a *confusio linguarum et dispersio populorum*.

Com o propósito de debelar o cruciante problema de língua internacional, várias foram as tentativas no sentido de adotar-se uma das línguas nacionais para as comunicações internacionais. O inglês e o castelhano são exemplos atuais, principalmente no comércio. O francês tem sido a língua internacional da cultura e da diplomacia. O latim é a língua oficial da Igreja.

malgranda kaj sekve facila la kontakton de la homoj. Detruitaj la geografiaj baroj kaj neniigitaj la distancoj, restas tamen la lingvaj baroj, starantaj inter la individuoj kaj ilin apartigantaj.

En epoko, kiam oni provas kun ia sukceso interplanedajn vojaĝojn, estas riproĉinda la fakto, ke la plej civilizitaj nacioj ankoraŭ ne adoptis unu facilan, logikan kaj riĉan internacilingvon, kiu estus konforma al la ceteraj kreaĵoj de la scienco.

Aperinta jam en la aŭroro de la civilizacio, la ideo de internacia helplingvo fariĝas pli kaj pli aktuala. La atento, kiun al ĝi estas dediĉata de saĝuloj el plej diversaj epokoj kaj nacioj pravas, ke la afero ne estas senigita je fundamento kaj graveco, kiel ŝajnas ne nur al laikoj, sed ankaŭ al skeptikuloj.

Bazita sur la historia tradicio, la plej antikva aludo al la plureco de lingvoj parolataj sur la Tero troviĝas en la Malnova Testamento. Laŭ la Sankta Skribo, ekde Babelo la homo suferas la spitadon de la lingvoj, kiel punon truditan de Dio pro la homa aroganteco. El Babelo do la *confusio linguarum et dispersio populorum*.

Celante la solvon de la dolora problemo de internacia lingvo, estis multaj la provoj por adopto de unu el la naciaj lingvoj por la internaciaj komunikiĝoj. La angla kaj la hispana lingvoj estas nuntempaj ekzemploj, precipe en la komerco. La franca estas uzata kiel internacia lingvo de la kulturo kaj de la diplomatio. La latina estas la oficiala lingvo de la Eklezio.

A ineficácia, porém, das línguas nacionais para esse fim tem sido comprovada desde a expansão do Império Romano. Levado o latim, língua da metrópole, pelas legiões romanas, às numerosas e distantes províncias do poderoso Império, teve esse idioma sorte diferente da de seus valorosos soldados. Na boca dos nativos subjugados, o latim degenerou, por assim dizer, transformando-se nos mais diversos falares regionais, produzindo o português, o italiano, o espanhol, o francês, o dalmático, o rético, o sardo, etc.

Não há negar que as línguas possuem, em sua estrutura, o caráter particular do povo em cujo seio elas se formaram. Elemento profundamente psíquico, elas estão impregnadas da índole dos respectivos povos, revelando mesmo, através de seu gênio, os traços mais acentuados da nacionalidade, os estados evolutivos dos povos e o seu espírito.

Formadas lentamente com o seu povo, as línguas assimilam, necessariamente, o seu caráter. Daí a feição tipicamente hierática do sânscrito milenar; daí o sabor docemente rural do latim, falado nos seus primórdios pelos camponeses do Lácio; daí poder fornecer tantos elementos para as artes e as ciências o grego antigo, em que foram vazadas as mais preciosas gemas da literatura clássica.

Esse caráter próprio presente em cada língua nacional é que deitou abaixo tantas tentativas feitas no sentido de usá-las como idiomas internacionais.

Impostas aos estrangeiros conquistados, elas perdiam a sua feição própria, degeneravam, como o latim. Cultivadas voluntariamente, com a consciência de liberdade, o seu aprendizado é difícil,

Sed ekde la ekspansio de la Roma Imperio estas pruvita la neefikeco de la naciaj lingvoj uzataj tiucele. Post kiam la latino, lingvo de la metropolo, estis portata de la romaj legioj al la malproksimaj provincoj de la potenca Imperio, tiu idiomo havis sorton diferencon de tiu de ĝiaj bravaj soldatoj. En la buŝo de la indiĝenaj popoloj, la latino degeneris, por tiel diri, en la plej diversajn regionajn lingvojn, naskante la portugalan, la italan, la hispanan, la francan, ktp.

Oni ne povas nei, ke la lingvoj havas en sia strukturo la apartan karakteron de la popolo, en kies sino ili formiĝis. Elementoj profunde psikaj, ili estas plenaj de la karaktero de siaj respektivaj popoloj, malkaŝante mem, per sia naturo, la plej elstarajn trajtojn de sia nacieco, la evoluajn statojn de la popoloj kaj ilian spiriton.

Malrapide formiĝinte kun sia popolo, la lingvoj neeviteble asimilas ĝian karakteron. De tio venas ja la tipe hieratika trajto de la jarmila sanskrito; de tio venas la agrable kampara gusto de la latino, en siaj fruaj tempoj parolata de la kamparanoj de Latio; de tio la fakto, ke al la artoj kaj sciencoj povas liveri tiom multe da elementoj la antikva greka lingvo, en kiu estas verkitaj la plej valoraj gemoj de la klasika literaturo.

Tiu aparta karaktero de ĉiu nacia lingvo fias kigas multege da provoj por ilia uzado kiel internacilingvoj.

Truditaj al la konkeritaj fremduloj, ili perdis sian apartan trajton kaj degeneris, kiel la latino. Spontanee kulturataj kun la konscienco de libereco, ilia lernado estas malfacila

por causa principalmente dos idiomatismos que as vinculam fortemente à alma do seu povo.

Daí depreenderem todos os estudiosos e especialistas do assunto, que uma língua universal deve ser criada adrede para esse fim, tendo-se em vista a sua eficácia, a regularidade de sua gramática, a facilidade de seu aprendizado, etc.

PRIMEIRAS TENTATIVAS DE SOLUÇÃO

Dada a sua importância, desde a mais remota antigüidade a conscientização desse problema vem documentada pela História, que nos revela o interesse com que homens de gênio se dedicaram a árduas lucubrações, visando a libertar a humanidade das tremendas cadeias do espírito, cadeias essas constituídas pelas numerosas línguas faladas no Globo. E diversos foram os caminhos que eles seguiram para atingir o seu objetivo.

Se todos eles, através dos séculos, foram unânimes em achar que devia ser fácil, lógica e sonora a língua internacional com que sábios e homens do povo sonhavam, diversas eram, entretanto, as suas opiniões quanto ao processo a ser adotado para a formação dessa língua.

Aonde iriam buscá-la? Serviria para esse fim qualquer uma das já existentes, ou deveria ser inventada uma nova língua?

A valer esta última hipótese, aproveitar-se-ia o material existente nas línguas naturais (sistema *a posteriori*), ou esse material deveria ser inteiramente criado pelo homem (sistema *a priori*)?

Na verdade, todos esses caminhos foram seguidos.

precipe pro la idiotismoj ilin forte katenantaj al la animo de sia popolo.

Jen estas la motivo, kial ĉiuj studemuloj kaj fakuloj konkludas, ke unu internacilingvo devas esti kreita specife por sia celo, koncerne sian efikecon, la regulecon de sia gramatiko, la facilecon de sia lernado, ktp.

UNUAJ PROVOJ DE SOLVO

Pro sia graveco, ekde la plej profunda antikveco la konscio pri tiu problemato estas dokumentita de la Historio, kiu malkaŝas al ni la interesecon, kun kiu geniaj homoj sin dediĉis al malfacilaj noktlaboroj, celante liberigi la homaron de la teruraj katenoj de la spirito, katenoj konsistantaj el la multnombraj lingvoj parolataj sur la Terglobo. Kaj estis diversaj la vojoj, kiujn ili sekvis por atingi sian celon.

Se ili ĉiuj unuanime opiniis, ke devus esti facile, logika kaj belsona la internacilingvo, pri kiu revis saĝuloj kaj vulgaruloj, diversaj tamen estis la opinioj pri la procedo adoptota por la formado de tiu lingvo.

Kie ili serĉus ĝin? Ĉu taŭgus por tiu celo ĉiu ajn el la jam ekzistantaj lingvoj, aŭ devus esti inventata nova lingvo?

Se validus tiu lasta supozo, ĉu oni profitus la materialon ekzistantan en la naturaj lingvoj (sistemo *a posteriori*), aŭ tiu materialo devus esti kreita de la homo (sistemo *a priori*)?

Verdire, ĉiuj tiuj vojoj estis sekvitaj.

Do século II até os nossos dias, diversas línguas naturais foram usadas para servirem de ponte do pensamento humano, desde o latim até o francês, o inglês, o castelhano, o alemão, etc. Cogitou-se mesmo do emprego do chinês para esse fim. A prática tem demonstrado, todavia, que as línguas nacionais não têm funcionado satisfatoriamente como idioma internacional, quer pelas dificuldades próprias da pronúncia e da gramática, quer ainda por outros motivos, como políticos, comerciais, culturais, etc.

Baldados os esforços de eminentes lingüistas, no sentido de adaptar o latim às necessidades da vida moderna, o que foi tentado através de modificações da gramática e atualização do vocabulário, novos caminhos foram buscados pelo homem. Interessaram-se vivamente pelo problema sábios e filósofos de renome internacional, como Teo Jung, Descartes, Leibnitz, Komensky e outros. Daí surgirem os projetos de "línguas filosóficas", que tinham o objetivo utópico de criar uma língua perfeita, lógica, destinada a substituir as línguas naturais; uma língua em que o significado das palavras não se depreendia do seu conjunto vocabular, mas dos elementos que as constituíam. E tal língua, pelas sutilezas e complexidade de sua estrutura, jamais se destinaria às camadas populares, mas unicamente a sábios, a inteligências privilegiadas. Seria, pois, um língua de elite.

Apresentaram projetos de "línguas filosóficas", entre outros, o espanhol P. Digbeus (1653), o inglês Thomas Urquhart (1653), o pedagogo inglês George Dalgarno (1661), o bispo inglês John Wilkins (1669), o húngaro G. Kalmar (1772), o francês Delormel (1795), o lingüista C. Letellier (1852). Além das "línguas filosóficas", foram criadas as pasigrafias (escritas universais) e as

Ekde la 2a jarcento ĝis niaj tagoj, multaj naturaj lingvoj estas uzitaj por servi kiel ponto de la homa penso, de la latina ĝis la franca, la angla, la hispana, la germana lingvoj, ktp. Oni eĉ pensis pri la uzo de la ĉina por tiu celo. Sed la praktiko montras, ke la naciaj lingvoj ne funkcias kontentige kiel internacia idioma, ĉu pro la malfacilaĵoj propraj al la elparolado kaj gramatiko, ĉu ankoraŭ pro aliaj kaŭzoj, kiel politikaj, komercaj, kulturaj, ktp.

Ĉar estis vanaj la penoj de eminentaj lingvistikistoj por adapti la latinon al la bezonoj de la moderna vivo, kion oni provis per modifoj de la gramatiko kaj aktualigo de la vortaro, la homoj serĉis novajn vojojn. Mondfamaj saĝuloj kaj filozofoj, kiel Teo Jung, Descartes, Leibnitz, Komensky kaj aliaj entuziasme interesiĝis pri la problemoj. El tiuj klopodoj rezultis la projektoj de "filozofiaj lingvoj", utopie celantaj la kreon de unu lingvo perfekta, logika, destinita anstataŭi la naturajn; unu lingvo, en kiu la signifon de la vortoj oni ne komprenu el la vorto mem, sed el la elementoj ĝin konsistigantaj. Kaj, pro la subtileco kaj komplekseco de sia strukturo, tia lingvo neniam sin destinus al la popolaj tavoloj, sed nur al saĝuloj, al privilegiaj inteligentuloj. Ĝi estus do elita lingvo.

Inter aliaj, prezentis projektojn de "filozofiaj lingvoj" la hispano P. Digbeus (1653), la anglo Thomas Urquhart (1653), la angla pedagogo George Dalgarno (1661), la angla episkopo John Wilkins (1669), la húngaro G. Kalmar (1772), la franco Delormel (1795), la lingvistikisto C. Letellier (1852). Krom la "filozofiaj lingvoj", oni kreis la pazigrafiojn (universalaj skriboj) kaj la

pasilalias (línguas universais), sistemas que consistiam não de palavras, mas de sinais (cifras, figuras, desenhos, hieróglifos, ideogramas, etc). O primeiro sistema de pasigrafia por cifras foi publicado em 1661, pelo cientista alemão J. J. Becher. Seguiram-se outros, todos porém de vida efêmera.

Uma das línguas mais curiosas que o gênio inventivo do homem criou foi, sem dúvida alguma, o Solresol. Criou-a o francês Jean Sudre, em 1866. Esta língua tinha o seu fundamento nas sete notas musicais universalmente conhecidas. Podia, segundo o seu inventor, ser não só falada e escrita, como também cantada ou executada em qualquer instrumento musical. Além disso, podia ser representada pelos algarismos arábicos de 1 a 7, bem como pelas sete cores.

Em 1880, o Monsenhor J. M. Schleyer, prelado romano natural de Baden, deu ao mundo o Volapuque. O progresso desse novo idioma foi surpreendente, a princípio. Dotado, porém, de uma gramática extremamente difícil, o Volapuque não vingou.

Baseados no que o Volapuque possuía de bom, outros sistemas surgiram: o Spelin, de Bauer; o Bopal, de Max; o Idioma Neutral, de diversos autores; o Dil, de Fieweger; o Balta, de Dormoy; o Orba, de José Guardiola; a Língua Azul, de Bolak, e ainda outros.

Com o insucesso do Volapuque o público já não tinha mais esperança em novas tentativas.

O ESPERANTO

Criado em 1887 pelo médico polonês Luís Lázar Zamenhof, o Esperanto é a língua interna-

pazilaliojn (universalaj lingvoj), sistemoj konsistantaj ne el vortoj, sed el signoj (ciferoj, figuroj, desegnoj, hieroglifoj, ideogramoj, ktp). La unua pazigrafia sistemo per ciferoj estis publikigita en 1661, de la germana scienculo J. J. Becher. Sekvis aliaj, sed ĉiuj de mallonga vivo.

Unu el la plej kuriozaj lingvoj kreitaj de la inventema genio de la homo estis sendube Solresol. Ĝin kreis la franco Jean Sudre en 1866. Tiu lingvo havis sian fundamenton el la 7 muzikaj notoj tutmonde konataj. Laŭ ĝia kreinto, ĝi povis esti ne nur parolata kaj skribata, sed ankaŭ kantata aŭ ludata per ĉia muzikilo. Krome, ĝi povis esti reprezentata per la arabaj ciferoj de 1 ĝis 7, kaj ankaŭ per la sep koloroj.

En 1880, la Monsinjoro J. M. Schleyer, roma prelado el Baden, donis al la mondo Volapukon (Volapük). La progreso de tiu nova idioma estis surpriza en la komenco. Sed pro ŝia ekstreme malfacila gramatiko, Volapuko ne prosperis.

Faritaj sur bazo de tio bona, kion Volapuko havis, aliaj sistemoj aperis: Spelin, de Bauer; Bopal, de Max; Idioma Neutral, de pluraj aŭtoroj; Dil, de Fieweger; Balta, de Dormoy; Orba, de José Guardiola; la Blua Lingvo, de Bolak, kaj aliaj.

Pro la malsukceso de Volapuko, la publiko jam ne havis plu esperon je novaj provoj.

ESPERANTO

Kreita en 1887, de la pola kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof, Esperanto estas la internacia

cional cujo êxito vem sendo assegurado, há quase um século, pela sua grande eficiência.

Influíram preponderantemente na formação do Esperanto dois fatores principais: o gênio lingüístico de Zamenhof e as condições em que este passou a sua infância em Bialystok, sua pequena cidade natal.

Bialystok era habitada por poloneses, alemães, hebreus e russos, elementos esses que, imbuídos de toda sorte de preconceitos, ao invés de usarem em suas relações quotidianas unicamente o idioma polonês, conservavam suas respectivas línguas, originando daí o mais negro cenário de lutas. Já na infância, Luís Lázaro Zamenhof pôde observar quantos e quão profundos inconvenientes decorrem da incompreensão motivada pela pluralidade de línguas. A ela associam-se, quase sempre, animosidades de natureza política. Horrorizado pelas lutas daqueles quatro elementos antagonicos, e impressionado pelo fantasma que se lhe ficara gravado na memória, por muito tempo, do pandemônio resultante do uso simultâneo de tantas línguas, numa pequena cidade, pôde Zamenhof generalizar o quadro de suas observações locais: era, com efeito, uma miniatura do panorama mundial. A Europa civilizada, fracionada em pequenos países fácil e rapidamente atravessáveis já no fim do século passado, sofre ainda hoje os efeitos nefastos causados pela diversidade das línguas. Transpostas as fronteiras geográficas, restam ainda as línguas — fronteiras do espírito.

Durante toda a sua vida estudantil sentiu Zamenhof a doçura ou o tormento do seu sonho. Idealista dos mais devotados, jamais permitiu que seu ardente entusiasmo se arrefecesse em proveito de outros interesses. Filho de família sem recursos

lingvo, kies sukceso estas garantiata jam de preskaŭ unu jarcento, pro sia efikeco.

Forte influis sur la formadon de Esperanto du ĉefaj faktoroj: la lingvistika genio de Zamenhof kaj la kondiĉoj, en kiuj li pasigis sian infanecon en Bialystok, sia naskiĝurbo.

Bialystok estis loĝata de poloj, germanoj, hebreoj kaj rusoj, homoj kiuj, penetritaj de ĉiaspecaj antaŭjuĝoj, anstataŭ uzi en siaj ĉiutagaj kontaktoj nur la polan idiomon, konservis ĉiu sian respektivan lingvon, kaj de tio rezultis la plej nigra scenejo de luktoj. Jam en sia infanaĝo Ludoviko Lazaro Zamenhof povis observi kiom multaj kaj kiom profundaj malutiloj rezultas de la malkompreno kaŭzita de la diverseco de lingvoj. Al ĝi preskaŭ ĉiam asociiĝas malpaciĝoj politikaj. Terurita de la luktoj de tiuj kvar kontraŭaj elementoj, kaj impresita de la fantomo, kiu restis longan tempon gravurita en lia menso, de la pandemonio naskita de la samtempa uzo de tiel multaj lingvoj, en malgranda urbo, Zamenhof povis ĝeneraligi la bildon de siaj lokaj observoj: efektive, ĝi estis ia miniaturito de la monda panoramo. La civilizita Eŭropo, diserigita en etajn landojn facile kaj rapide traireblajn jam en la fino de la lasta jarcento, ankoraŭ nun suferas la pereigajn efikojn de la diverseco de lingvoj. Transiritaj la geografiaj limoj, restas ankoraŭ la lingvoj — limoj de la spirito.

Dum sia tuta lerneja aĝo Zamenhof sentis la dolĉecon kaj la turmenton de sia revo. Idealisto el la plej sindonaj, li neniam permesis, ke lia arda entuziasmo malvarmiĝu profite de aliaj intereso. Ĉar li estis filo de neriĉa familio, despli granda de-

financeiros, maior devia ser a força com que havia de vencer nessa luta.

Ginasiano ainda, o jovem Zamenhof já era idealista. Para ele, a futura língua universal não podia, de maneira alguma, consistir de elementos inventados, forjados pela fantasia; não seria artificial a nova língua, mas natural, formada dos elementos já abundantemente gerados pelas línguas nacionais. As raízes mais comuns desses idiomas passariam para a nova língua, obedecendo a uma gramática fácil, regular e completamente isenta de exceções. Por meio de afixos com sentido mais ou menos definido, essas raízes expressariam numerosas idéias, processo interessante e econômico, uma vez que tornaria dispensáveis dicionários volumosos.

Já na faculdade de medicina, o ideal ainda o acompanhava, cada vez mais vivo, mais ardente. Médico recém-formado,urgia que desse início à sua clínica, o que não prometia muito, dado o sincero humanitarismo que o novo médico dispensava a seus clientes, quase todos pobres. Ainda assim, depois de longa hesitação e auxiliado financeiramente pelo seu futuro sogro, homem inculto mas compreensivo, deu Zamenhof a lume, em 1887, sua primeira brochura intitulada LINGVO INTERNACIA.

É interessante notar que, para não aparecer em público como idealista, o que talvez poderia prejudicá-lo profissionalmente, não quis o autor de LINGUA INTERNACIONAL subscrever com seu verdadeiro nome a sua pequena obra, usando para isso o pseudônimo que forjara na língua internacional: DOKTORO ESPERANTO (Doutor Esperancoso). Pouco tempo depois, os adeptos da nova língua passaram a designá-la por ESPERANTO, nome que permaneceu definitivamente.

vis esti la forto, per kiu li devus venki en tiu lukto.

Ankoraŭ gimnaziano, la juna Zamenhof jam estis idealisto. Liaopinie, la estonta internacilingvo neniel povus konsisti el inventitaj elementoj, elforgita de la fantazio; la nova lingvo ne estus artefarita, sed natura, farita el la elementoj jam abunde kreitaj de la naciaj lingvoj. La radikoj plej komunaj al tiuj idiomoj enirus en la novan lingvon, obeante al facila, regula kaj tute senescepta gramatiko. Pere de afiksoj kun pli-malpli difinita senco, tiuj radikoj esprimus multajn ideojn — interesa kaj ekonomia procedo, pro tio, ke ĝi evitus la grandajn vortarojn.

Jam ĉe la Medicina Fakultato, lia idealo ankoraŭ akompanis lin, pli kaj pli viva kaj arda. Urĝiĝis ke li, ĵusdiplomita kuracisto, komencu sian praktikadon, kio ne promesis multon, pro la sincera humaneco, kun kiu li traktis siajn klientojn, preskaŭ ĉiuj malriĉaj. Eĉ tiel, post longa hezitado kaj mone helpata de sia estonta bopatro, viro nekle- ra sed komprenema, Zamenhof publikigis en 1887 sian unuan broŝuron sub la titolo LINGVO INTERNACIA.

Notinde estas, ke, por ne aperi publike kiel idealisto, kio eble malutilus al li profesie, la aŭtoro de LINGVO INTERNACIA ne volis subsribi per sia vera nomo sian verketon, kaj uzis por tio la pseŭdonimon de li kreitan en la internacia lingvo: DOKTORO ESPERANTO. Tuj poste, la adeptoj de la nova lingvo komencis nomi ĝin ESPERANTO, nomo kiu restis definitive.

Logrou êxito o Esperanto. Desde o início essa língua contou com a simpatia de intelectuais de renome, em todo o mundo. Tolstói, Einstein, o polonês Wasniewski, o americano Henry Philips e os franceses Louis de Beaufront, Gaston Moch e Cart figuram entre os grandes homens que não só estudaram o Esperanto, como também puseram sua sabedoria a serviço do movimento esperantista.

Um dos fatores que mais contribuíram para a propagação do Esperanto logo após a publicação do primeiro livro foi o entusiasmo e a persistência com que Zamenhof se dirigia, por cartas e artigos, a milhares de pessoas das mais diversas profissões e formação cultural, dando notícia da nova língua, demonstrando a sua facilidade e eficácia, e convidando-as para estudá-la e divulgá-la.

De fato, além de fácil, a gramática do Esperanto era extremamente simples, cabendo toda ela num cartão postal, visto constar apenas de 16 regras isentas de exceções. Quanto ao seu vocabulário, qualquer ginásiano o reconhece, com exceção de uma ou outra palavra, à primeira vista, sem auxílio de dicionário. Seu sistema fonético é igualmente fácil, pois cada letra tem um único som, sendo paroxítonas todas as palavras com mais de uma sílaba. Todos os substantivos terminam em -o, sem exceção! Assim, libro (livro), viro (homem), virino (mulher), kajero (caderno), nubo (nuvem), kapro (bode), kaprino (cabra). Os adjetivos terminam em -a para os dois gêneros: bona (bom, boa), alta (alto, alta). Com esta terminação formam-se adjetivos derivados de outras palavras: Dio (Deus), dia (divino); koro (coração), kora (cordial), frato (irmão), frata (fraterno). Os numerais são invariáveis: unu (1), du (2), tri (3), kvar (4), kvin (5), ses (6), sep (7), ok (8), naŭ (9), dek (10),

Esperanto prosperis. Ekde la komenco tiu lingvo ricevis la simpatian de mondfamaj intelektuloj. Tolstoj, Einstein, la pola Wasniewski, la usonano Henry Philips kaj la francoj Louis de Beaufront, Gaston Moch kaj Cart figuras inter la eminentuloj, kiuj ne nur studis Esperanton, sed ankaŭ utiligis sian saĝon profite de la esperantista movado.

Unu el la faktoroj, kiuj plej multe kontribuis al la disvastigado de Esperanto tuj post la publikigo de la unua libro, estis la entuziasmo kaj persisto, kun kiu Zamenhof direktiĝis, per leteroj kaj artikoloj, al miloj da homoj el la plej diversaj profesioj kaj instruiteco, ilin sciigante pri la nova lingvo, al ili montrante ĝian facilecon kaj efikon, kaj ilin invitante studi kaj divastigi ĝin.

Fakte, krom facila, la gramatiko de Esperanto estis ekstreme simpla kaj povis esti presita sur poŝtkarton, ĉar ĝi konsistis el nur 16 reguloj sen esceptoj. Rilate al ĝia vortaro, escepte de unu aŭ alia vorto, ĉiu gimnaziano ĝin rekonas ĉe la unua rigardo, sen helpo de vortaro. Ankaŭ ĝia fonetika sistemo estas facila, ĉar ĉiu litero havas nur unu sonon, kaj ĉiuj vortoj de pli ol unu silabo estas paroksitonaj. Ĉiuj substantivoj finiĝas per -o, sen escepto! Tiel, libro, viro, virino, kajero, nubo, kapro, kaprino. La adjektivoj finiĝas per -a por ambaŭ genroj: bona, alta. Per tiu finaĵo formiĝas adjektivoj derivitaj elde aliaj vortoj: Dio, dia; koro, kora; frato, frata. La numeraloj estas nevariaj: unu (1), du (2), tri (3), kvar (4), kvin (5), ses (6), sep (7), ok (8), naŭ (9), dek (10),

cent (100), mil (1000). Os verbos no infinitivo terminam sempre em -i: ami (amar), kisi (beijar). Não flexionam quanto à pessoa e número, apenas quanto ao tempo. No presente os verbos terminam em -as: mi amas (eu amo), vi amas (tu amas, você ama, vós amais, vocês amam). No pretérito, em -is: mi amis (eu ameí ou amava). No futuro do presente, em -os. No futuro do pretérito, em -us.

O sistema de afixos (prefixos e sufixos) do Esperanto torna possível a formação de grande número de novos vocábulos, bem como a sua pronta identificação, sem a necessidade de se recorrer a gramáticas e dicionários. O prefixo mal —, por exemplo, indica idéia contrária: facila (fácil), mal-facila (difícil); bona (bom), malbona (mau), etc.

Estas regras tomadas ao acaso e o vocabulário facilimo é que têm assegurado o progresso do Esperanto em todo o mundo, tanto no Ocidente como no Oriente. De fato, *Esperanto estas tre facila!* (O Esperanto é muito fácil!).

O MOVIMENTO ESPERANTISTA

De 1887, ano em que foi publicado o primeiro livro de Esperanto, a 1905, pode-se dizer que foi de gabinete a atividade de Zamenhof. Nesse período o criador do Esperanto traduziu na nova língua o Velho Testamento e grande número de obras clássicas. Escreveu centenas de artigos para revistas esperantistas e ainda correspondeu-se com centenas de pessoas de todos os continentes. E é nessas atividades que ele se revela grande estilista, permanecendo sua obra como modelo de estilo e correção gramatical até os nossos dias. No ano de 1905 realiza-se o 1º Congresso Universal de Esperanto em Boulogne-sur-Mer, França, a que compareceu Zamenhof acompanhado de sua dedicada

cent (100), mil (1000). La verboj en infinitivo finiĝas ĉiam per -i: ami, kisi. Ili ne varias laŭ persono kaj nombro, nur laŭ la tempo. En la prezenco la verboj finiĝas per -as: mi amas, vi amas. En la preterito, per -is: mi amis. En la futuro, per -os. En la kondicionalo, per -us.

La sistemo de afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj) de Esperanto ebligas la formadon de granda nombro da novaj vortoj, kaj ankaŭ ilian tujan rekonon, sen bezono de konsultado al gramatikoj kaj vortaroj. La prefikso mal- ekzemple, indikas ideon kontraŭan: facila, malfacila; bona, malbona, ktp.

Tiuj reguloj hazarde prenitaj kaj la facilega vortaro garantiis ja la progreson de Esperanto en la tuta mondo, tiel en Okcidento kiel en Oriento. Efektive, **ESPERANTO ESTAS TRE FACILA!**

LA ESPERANTISTA MOVADO

Ekde 1887, kiam estis publikigita la unua lernolibro de Esperanto, ĝis 1905, oni povas diri, ke estis kabineta da aktiveco de Zamenhof. En tiu periodo, la kreinto de Esperanto tradukis en la novan lingvon la Malnovan Testamenton kaj grandan nombron da klasikaj verkoj. Li verkis centojn da artikoloj por esperantistaj revuoj kaj ankoraŭ korespondis kun centoj da personoj el ĉiuj kontinentoj. Kaj en tiu aktiveco li montriĝas kiel granda stilisto, kaj lia verkaro restas ĝis nuntempe kiel modelo de stilo kaj de gramatika korekteco. En la jaro 1905 efektiviĝas la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, Francujo; tiun kongreson partoprenis Zamenhof akompanata de

esposa Clara Zilbernik. O Congresso teve grande sucesso. Em sua sessão de abertura, Zamenhof leu um belo discurso em Esperanto, terminando-o com uma prece de sua autoria, intitulada *Preĝo sub la Verda Standardo* (Prece sob o Verde Estandarte), de sentido profundamente universalista. A sessão tinha sido aberta ao som do hino nacional francês vertido para o Esperanto, seguido do hino dos esperantistas *LA ESPERO* (A Esperança), cuja letra é também de autoria de Zamenhof. Ao primeiro Congresso Universal seguiram-se dezenas de outros, realizados anualmente em países diferentes e interrompidos somente durante as duas guerras mundiais. No ano passado (1975) realizou-se o 60º Congresso Universal, em Copenhague, Dinamarca.

Esses Congressos são organizados pela Universal Esperanto-Asocio (Associação Universal de Esperanto), com sede na Holanda. Esta organização, que conta com uma rede de delegados em mais de 80 países, tem feito grande empenho no sentido de manter a unidade lingüística do Esperanto em todo o Globo. Além disso, vem a Associação Universal de Esperanto mantendo relações consultivas com a UNESCO desde a Conferência de Montevideu, em 1954.

Filiadas ou não à Associação Universal de Esperanto, em todos os países do mundo funcionam associações, institutos, grupos e clubes esperantistas.

Homens de talento dominam o Esperanto para nele erigirem os monumentos literários, em prosa e em verso, constituindo assim uma nova literatura que já não cabe nos estreitos limites de uma nação nem tampouco de um hemisfério, mas que cresce com admirável viço para em breve transformar-se na rica LITERATURA UNIVERSAL. Esta literatura

sia sindona edzino Clara Zilbernik. La kongreso havis grandan sukceson. Ĉe ĝia malferma kunsido Zamenhof faris belan paroladon en Esperanto, ĝin finante per preĝo verkita de li, sub la titolo "Preĝo sub la Verda Standardo", profunde universalisma. La kunsido malfermiĝis per la muziko de la franca nacia himno, sekvata de la himno de la esperantistoj "La Espero", kies teksto estas verkita de Zamenhof. La 1-an Universalan Kongreson de Esperanto sekvis dekkelke da aliaj ĉiujare efektiviĝintaj en diversaj landoj kaj interrompitaj nur de la du Mondmilitoj. En la jaro 1975 okazis la 60a Universal Kongreso en Kopenhago, Danujo.

Tiuj Kongresoj estas organizitaj de la Universal Esperanto-Asocio, kun sidejo en Nederlando. Tiu organizaĵo, kiu havas reton da delegitoj en pli ol 80 landoj, estas klopodanta teni la lingvan unuecon de Esperanto en la tuta Globo. Krome, la Universal Esperanto-Asocio estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO ekde la Konferenco en Montevideo, en 1954.

Aligintaj aŭ ne al la Universal Esperanto-Asocio, en ĉiuj landoj de la mondo funkcias esperantistaj asocioj, institutoj, grupoj kaj kluboj.

Talentaj homoj ellernas Esperanton por konstrui en ĝi la literaturajn monumentojn en prozo kaj en verso, tiel kreante ian novan literaturon ne enteneblan en la malvastaj limoj de unu nacio kaj eĉ ne de unu hemisfero, sed tamen kiu kreskas kun mirinda vigleco por tuj poste aliformiĝi en la riĉan UNIVERSALAN LITERATURON. Tiu literaturo jam

já conta hoje com cerca de 50.000 títulos, em obras de todos os gêneros: literárias, científicas, filosóficas, religiosas, históricas, etc. Em primorosas traduções já existem, para citarmos apenas algumas, no idioma de Zamenhof: a BÍBLIA, o BHAGAVAD-GÍTĀ, o ALCORÃO, o KALEVALA (epopéia finlandesa), A IMITAÇÃO DE CRISTO, A DIVINA COMÉDIA, de Dante Alighieri, OS LUSÍADAS, de Camões, MARTÍN FIERRO (epopéia da Argentina), O FARAÓ, do polonês Boleslaw Prus, SENHOR TADEU, de Adam Mickiewicz, (epopéia polonesa), QUO VADIS?, de H. Sienkiewicz, ROMEU E JULIETA, REI LEAR e outras obras de Shakespeare, PEER GYNT, de Ibsen, GÖSTA BERLING, de Selma Lagerlöf, O ROMANCE DE SAN MICHELE, de A. Munthe, TARTARIN DE TARASCON, de A. Daudet, O PEQUENO PRÍNCIPE, de Saint-Exupéry, DIÁRIO DE ANNE FRANK e uma infinidade de obras de autores famosos de todas as literaturas do Ocidente e do Oriente, e de todas as épocas, como TAGORE, REMARQUE, BAUDELAIRE, MAUPASSANT, CERVANTES, SARTRE, DICKENS, BLASCO IBAÑEZ, ESOPHO, o CARDEAL WISEMAN, OOGAI, SYUKIN, GOGOL, TOLSTÓI e muitos outros.

No Brasil já possuímos em Esperanto obras de CASTRO ALVES, JOSÉ DE ALENCAR (A VIUVINHA e IRACEMA), MACHADO DE ASSIS (TEATRO), um ensaio biográfico de RUI BARBOSA, de Fernando Nery, e grande número de poemas, contos e páginas esparsas de dezenas de autores. Corre mundo em Esperanto a autobiografia de Edson Arantes do Nascimento, sob o título MI ESTAS PELÉ (EU SOU PELÉ).

Também em Esperanto já existem revistas especializadas de Direito, Pedagogia, Geografia,

konsistas hodiaŭ en ĉ. 50.000 titoloj en verkoj de ĉiuj ĝenroj: literaturaj, sciencaj, filozofiaj, religiaj, historiaj, ktp. En belaj tradukoj jam ekzistas, en la Zamenhofs idiomo, por citi nur kelkajn: la BIBLIO, BHAGAVAD-GÍTĀ, LA KORANO, KALEVALA (finna epopeo), LA IMITADO DE KRISTO, LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, LA LUZIDOJ, de Camões, MARTÍN FIERRO (argentina epopeo), LA FARAONO, de la polo Boleslaw Prus, SINJORO TADEO, de Adam Mickiewicz (pola epopeo), QUO VADIS?, de H. Sienkiewicz, ROMEO KAJ JULIETO, REĜO LEAR k. a. verkoj de Shakespeare, PEER GYNT, de Ibsen, GÖSTA BERLING, de Selma Lagerlöf, LA ROMANO DE SAN MICHELE, de A. Munthe, TARTARIN DE TARASKONO, de A. Daudet, LA ETA PRINCO, de Saint-Exupéry, TAGLIBRO DE ANNE FRANK, kaj multnombraj verkoj de famaj aŭtoroj de ĉiuj literaturoj el Okcidento kaj Oriento, kaj de ĉiuj epokoj, kiel ekzemple: TAGORE, REMARQUE, BAUDELAIRE, MAUPASSANT, CERVANTES, SARTRE, DICKENS, BLASCO IBAÑEZ, EZOPO, KARDEALO WISEMAN, OOGAI, SYUKIN, GOGOL, TOLSTOI kaj multaj aliaj.

En Brazilo ni jam posedas en Esperanto verkojn de CASTRO ALVES, JOSÉ DE ALENCAR (LA VIDVINETO kaj IRACEMA), MACHADO DE ASSIS (TEATRO), unu biografian eseon de Rui Barbosa, de Fernando Nery, kaj grandan nombron da poemoj, rakontoj kaj disaj paĝoj de dekoj da aŭtoroj. Disvastiĝas en la mondo, en Esperanto, la aŭtobiografio de Edson Arantes do Nascimento, sub la titolo MI ESTAS PELÉ.

En Esperanto jam ekzistas ankaŭ fakaj revuoj pri Juro, Pedagogio, Geografio, Kemio,

Química, Temas Bíblicos, etc., publicadas em diversos países principalmente na Europa.

O ESPERANTO NO BRASIL

Desde os primórdios de sua divulgação o Esperanto tem encontrado ambiente propício em nosso País. Homens de cultura, como o Dr. Everardo Backheuser, o Prof. João Batista de Melo e Sousa, o Engenheiro Alberto Couto Fernandes, o Prof. Porto Carreiro Neto, o Dr. Miguel Timponi, Prof. Carlos Domingues, o Embaixador José Carlos de Macedo Soares, Ministro das Relações Exteriores e muitos outros receberam com simpatia o novo idioma, tendo-o aprendido e nele deixado valiosos escritos.

O mesmo carinho o Esperanto tem recebido por parte de nossos estadistas. Basta dizer que o Brasil foi o primeiro país a considerar o Esperanto língua clara para os telegramas interiores. Esta resolução foi tomada em 1906, pelo então Ministro da Viação, Dr. Lauro Müller, por solicitação do Deputado Medeiros e Albuquerque, presidente do Brasileira Klubo de Esperanto. O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística (hoje Fundação) não só usou o Esperanto em suas publicações, como também já pôs sua gráfica a serviço do movimento esperantista.

Como assinalamos acima, inúmeras obras da literatura brasileira já foram traduzidas para o Esperanto, graças às iniciativas da Liga Brasileira de Esperanto, da Cooperativa Cultural dos Esperantistas e da Federação Espírita Brasileira, todas do Rio de Janeiro.

Digno de nota é o empenho com que a Federação Espírita Brasileira vem divulgando, há 40 anos, grande número de suas principais obras dou-

Bibliaj Temoj, ktp., publikigitaj en diversaj landoj precipe en Eŭropo.

ESPERANTO EN BRAZIL

Ekde la komenco de sia disvastigo, Esperanto trovas favoran medion en nia Lando. Kleraj homoj, kiel D-ro Everardo Backheuser, Prof. João Batista de Melo e Souza, Ingeniero Alberto Couto Fernandes, Prof. Porto Carreiro Neto, D-ro Miguel Timponi, Prof. Carlos Domingues, Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, ministro por Eksterlandaj Aferoj, kaj multaj aliaj simpatie akceptis la novan idiomon kaj ĝin lernis, en ĝi postlasante multvalorajn verkojn.

Saman zorgon Esperanto ricevis flanke de niaj ŝtatuloj. Sufiĉas diri, ke Brazilo estas la unua lando, kiu konsideris Esperanton kiel klaran lingvon por internlandaj telegramoj. Tiu decido estis farita en 1906 de la tiam ministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj, D-ro Lauro Müller, laŭ peto de la Deputito Medeiros e Albuquerque, prezidanto de la Brasileira Esperanto-Klubo. La Brasileira Instituto de Geografio kaj Statistiko (hodiaŭ Fondaĵo), ne nur uzis Esperanton en siaj publikigaĵoj, sed ankaŭ disponigis sian presejon serve al la esperantista movado.

Kiel ni rimarkigis ĉi-supre, multnombraj verkoj de la brasileira literaturo jam estas tradukitaj en Esperanton, dank'al iniciatoj de la Brasileira Esperanto-Ligo, de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj de la Brasileira Spiritisma Federacio, ĉiuj el Rio de Janeiro.

Notinda estas la interesiĝo, kun kiu la Brasileira Spiritisma Federacio disvastigas jam de 40 jaroj grandan nombron de siaj ĉefaj doktrinaj verkoj

trinárias em Esperanto. Foi com esse propósito que, por sugestão do saudoso Prof. Ismael Gomes Braga, se fundou a 1ª de março de 1937, naquela conceituada organização espírita, o Departamento de Esperanto. Desde então correm mundo, no idioma de Zamenhof, as seguintes obras: "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo", "O Livro dos Espíritos", de Allan Kardec, "O Evangelho Segundo o Espiritismo", de Allan Kardec, "O Livro dos Médiuns", de Allan Kardec, "O que é o Espiritismo", de Allan Kardec, "Há Dois Mil Anos...", de Francisco Cândido Xavier, "Paulo e Estêvão", de Francisco Cândido Xavier, "Bhagavad Gîtâ", "Nosso Lar", de Francisco Cândido Xavier, "Ação e Reação", de Francisco Cândido Xavier, "Agenda Cristã", de Francisco Cândido Xavier, "Na Sombra e na Luz", de Zilda Gama, "Introdução ao Estudo da Doutrina Espírita", de Allan Kardec, "Preces Espíritas", de Allan Kardec, "O Martírio dos Suicidas", de Almerindo Martins de Castro, "Ismael Gomes Braga", de Zêus Wantuil, "Médiuma Poemaro", de Porto Carreiro Neto, "O Lobo Mau Reencarnado", de Roque Jacintho, "A Caminho da Luz", de Francisco Cândido Xavier. Além das obras doutrinárias em prosa e em verso acima mencionadas, a Federação Espírita Brasileira tem publicado também excelentes livros destinados ao aprendizado do Esperanto, como "Esperanto sem Mestre", de Francisco Valdomiro Lorenz, "Primeiro Manual de Esperanto" e o excelente "Dicionário Esperanto-Português", de Ismael Gomes Braga.

en Esperanto. Estis ja kun tiu intenco, ke, laŭ sugesto de la karmemora Prof. Ismael Gomes Braga, fondiĝis, la 1-an de Marto 1937, en tiu bonreputacia spiritisma organizaĵo, la Departemento de Esperanto. Ekde tiam disvastiĝas tra la mondo, en la idiomo de Zamenhof, la jenaj verkoj: VOĈOJ DE POETOJ EL LA SPIRITA MONDO, LA LIBRO DE LA SPIRITOJ, de Allan Kardec, LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO, de Allan Kardec, LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ, de Allan Kardec, KIO ESTAS SPIRITISMO?, de Allan Kardec, ANTAŬ DU MIL JAROJ..., de Francisco Cândido Xavier, PAŬLO KAJ STEFANO, de Francisco Cândido Xavier, BHAGAVAD-GÎTÂ, NIA HEJMO, de Francisco Cândido Xavier, AGO KAJ REAGO, de Francisco Cândido Xavier, KRISTANA AGENDO, de Francisco Cândido Xavier, EN OMBRO KAJ EN LUMO, de Zilda Gama, ENKONDUKO EN LA STUDADON DE LA SPIRITISMA DOKTRINO, de Allan Kardec, PREĜLIBRO POR SPIRITISTOJ, de Allan Kardec, LA TURMENTEGO DE LA MEMMORTIGINTOJ, de Almerindo Martins de Castro, ISMAEL GOMES BRAGA, de Zêus Wantuil, MEDIUMA POEMARO, de Porto Carreiro Neto, MALBONA LUPO REENKARNIGINTA, de Roque Jacintho, SUR LA VOJO AL LA LUMO, de Francisco Cândido Xavier. Krom la doktrinaj verkoj en prozo kaj en verso ĉi-supre menciitaj, la Brazilia Spiritisma Federacio publikigis ankaŭ bonegajn librojn destinitajn al la lernado de Esperanto, nome ESPERANTO SEM MESTRE (Esperanto sen Instruisto), de Francisco Valdomiro Lorenz, PRIMEIRO MANUAL DE ESPERANTO (Unua Lernolibro de Esperanto) kaj la bonegan DICIONÁRIO ESPERANTO-PORTUGUÊS (Vortaro Esperanto-Portugala), de Ismael Gomes Braga.

Incontestavelmente, a divulgação do Esperanto em nosso País muito deve ao trabalho que a Federação Espírita Brasileira e muitos espíritas vêm realizando há quase meio século.

Não podemos deixar de registrar aqui que os livros "Nosso Lar", de Francisco Cândido Xavier, e "O Livro dos Espíritos", de Allan Kardec, foram traduzidos para o idioma japonês, não diretamente dos textos originais em português e francês, respectivamente, mas das excelentes traduções em Esperanto, feitas pelo grande clássico do Idioma Internacional, Dr. Porto Carreiro Neto.

Na Terra, como no Além, o programa maior é inegavelmente um só: o da Confraternização das Criaturas. Zamenhof aspirava a esse clima de Harmonia aqui na Terra. Criou o Esperanto, que se destina a ser a grande ponte que une as nações, os hemisférios, as culturas e os homens. Segundo o relato de muitos Espíritos, esta língua internacional tem sido empregada como meio de comunicação também nas esferas superiores, onde a compreensão recíproca é o fundamento do Amor.

Aqui, como no alto, portanto, o programa é um só: Amor.

Oxalá os homens aproveitem o instrumento ideal que Zamenhof legou à Humanidade. Aprender o Esperanto é dar um passo na senda da evolução moral e espiritual. Divulgá-lo é missão apostólica.

Sendiskute, la disvastigo de Esperanto en nia Lando multe ŝuldas al la laboro, kiun la Brazilia Spiritisma Federacio kaj multaj spiritistoj estas efektivigintaj jam de preskaŭ duona jarcento.

Ni ne povas ne registri ĉi tie, ke la libroj NIA HEJMO, de Francisco Cândido Xavier, kaj LA LIBRO DE LA SPIRITOJ, de Allan Kardec, estas tradukitaj en la japanan idiomon ne rekte el la originalaj tekstoj en la portugala kaj franca lingvoj, respektive, sed el la bonegaj Esperantaj tradukoj, faritaj de la granda klasikulo de la Internacia Idiom, D-ro Porto Carreiro Neto.

Sur la Tero, same kiel en la Transmondo, la plej granda programo estas nur unu: tiu de la Kunfratigo de la Kreitoj. Zamenhof aspiris al tiu klimato de Harmonio ĉi tie sur la Tero. Li kreis Esperanton, kiu sin destinas esti la granda ponto unuiganta la naciojn, la hemisferojn, la kulturojn kaj la homojn. Laŭ la raporto de multaj Spiritoj, tiu internacia lingvo estas uzata kiel komunikilo ankaŭ en superaj sferoj, kie la reciproka komprenado estas la fundamento de Amo.

Tie ĉi, same kiel en la Superaj Regionoj, la programo estas unu sola: Amo.

Dio volu, ke la homoj profitu la idealan instrumenton, kiun Zamenhof postlasis al la Homaro. Lerni Esperanton estas fari paŝon sur la vojo de la morala kaj spirita evoluo. Ĝin disvastigi estas apostola misio.